POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.	KRAKÓW CZERWIEC 1927 JUNIO	Nr. 6. N-o

ESPERANTO JĘZYKIEM ŻYJĄCYM.

SPERANTO jest językiem żywym, gdyż jest mową małego ludu, który go kocha i nim się ustawicznie posługuje — powiedział prof. Cart, prezes Akademji Esperanckiej. Człowiek, który stoi na straży nienaruszalności, a jednocześnie rozwoju języka, wypowiedział myśl ważną w swem znaczeniu.

Gdyby Volapück żył nieco dłużej, umarłby niezawodnie dlatego, że pozostając własnością autora, nie miałby możności udoskonalenia się, rozwijania przez życie, a więc żyć. Inaczej przedstawia się sprawa Esperanta. Autor zrzekł się praw do swego dzieła na korzyść wszystkich ludzi, którzy Esperanto używają. Już od tego czasu Esperanto stało się własnością zbiorowiska jego adeptów, podobnić jak jęz. polski jest językiem narodu polskiego, francuski — francuskiego. Fakt ten doniosłego znaczenia postawił Esperanto na płaszczyźnie, na której stoją języki żywe.

Tworzenie nowych wyrazów, pogłębianie znaczenia starych, wykuwanie z dawnego materjału nowych wyrażeń — oto praca pisarzy i myślicieli nad rozwojem języka. Taką rolę np. w polskim języku odegrali Krasiński, Żeromski, Sienkiewicz i wielu innych. A jeśli ich inowacje znajdą powszechne użycie u społeczności, która się językiem danym posługuje, powiadamy, że język ten się wzbogacił.

Jeśli przypomnimy sobie dzieje pewnych wyrazów, czy wyrażeń esperanckich, musimy przyjść do wniosku, że Esperanto w swym rozwoju postępuje po drodze, po której kroczą języki żywe. I dzięki temu ustawicznemu rozwojowi styl naszych pierwszych pisarzy esperanckich, choć najzupełniej zrozumiały, tchnie nieco archaizmem.

To, co się rzekło, nazywa się naturalnym rozwojem języka. Dlatego prof. Cart śmiało i słusznie wysnuwa wniosek, że Esperanto rozwija się narówni z językami żyjącymi, a więc samo jest tworem żywym.

Akademja Esperancka pozostaje tylko obserwatorem ruchu rozwojowego języka, stawiając swą pieczęć na wyrazach lub wyrażeniach, które są już w powszechnem użyciu oraz nie sprzeciwiają się duchowi języka.

Czyn, którym Zamenhof zrzekł się praw do swego tronu, czy był świadomie przeprowadzony, czy też wypłynął z prostej skromności, zaliczyć należy do jego genjuszu, gdyż genjusz niekoniecznie przejawiać się musi w sferze świadomości.

Ale zdanie, przytoczone na początku, zawiera jeszcze ukrytą myśl inną, nie mniejszej wagi. Skoro Esperanto żyje i rozwija się w sposób naturalny, sprawa esperancka przestała być problemem lingwistycznym, zaprzątającym umysły adeptów innych prób języków sztucznych albo też mniej lub więcej szczęśliwych przeróbek Esperanta, ruch esperancki należy rozpatrywać pod kątem widzenia sprawy społecznej. Świadomie nie używam wyrazu „ruch społeczny", aby uniknąć zarzutu „niepowszechności", w porównaniu z ruchami społeczno-politycznymi.

Esperanto w świetle li-tylko sprawy społecznej może zwyciężyć. Dlatego nie dziwmy się, że przeróżne instytucje na czele z Ligą Narodów uznały już Esperanto częściowo lub zupełnie za język powszechny.

A jak w tem świetle wyglądają nasi liczni konkurenci? Język, który pretenduje do oficjalnego uznania go za język międzynarodowy, musi przejść przez dwie zasadnicze fazy. Pierwszą jest próba języka wówczas, gdy język jest jeszcze w laboratorjum lingwistów, a sprawa społeczna nie istnieje, druga jest wtedy, gdy język zaczyna żyć naturalnie, gdy mierzy go się odważnikami życia, a sprawa społeczna się rodzi.

Jeśli pod tym kątem spojrzymy na różne Ida, Roje i Okcidentale, zauważymy, że są one bądź to w fazie próby i nie zdołały jeszcze stworzyć sprawy społecznej, bądź to, i tem gorzej dla nich, w fazie próby, ale zdołały sobie stworzyć ruch. Tem gorzej, gdyż wówczas energja kinetyczna ruchu znajduje swe ujście przeważnie na polu lingwistycznem.

Inne więc próby języków powszechnych, skoro chcą poważnie konkurować z Esperantem, muszą go doścignąć w jego rozwoju. Czy zdołają dokazać tego? Bardzo wątpię, ale i wówczas w świadomości przeciętnego człowieka, a przecież o tę świadomość bardzo chodzi, Esperanto będzie miało przewagę swej historji.

Taka jest praca Esperanta w ciągu czterdziestolecia jego istnienia. Bądźmy więc dumni z tego dorobku, nie spoczywając jednocześnie na laurach.

M. Trochimowski (Warszawa).



JULJUSZ SŁOWACKI

JULJUSZ SŁOWACKI.

Polujo honoras en la nuna momento la grandan majstron de sia literaturo, Słowacki'n, entombigante Liajn cindrojn en la subteraĵoj de l' Krakow'a katedralo, en la pola Westminster. Ĝi honoras en Słowacki grandan poeton, kiu simile al multaj eminentuloj de nia nacio en la XIX. jc. pro politikaj cirkonstancoj formigris el la Patrujo kaj en fremda tero estis „kavaliro de supertera batalo, pro nia nacieco".

Depost la morto de Słowacki forpasos baldaŭ okdek jaroj. Li naskiĝis en la j. 1809, fininte la universitaton en Wilno, estis oficisto en ministerio de financoj de pola Reĝolando, kiam komenciĝis la insurekcio de 1830/31. En marto 1831 li forlasis Varsovion veturante tra Germanujo Anglujon, poste Francujon. Ne povante reveni dekok jarojn li pasigis laŭvice en Svisujo, Italujo, faris vojaĝon al Greklando, Egipto kaj Palestino, post kio li ekloĝis en Parizo. Tie li mortis la 3-an de aprilo 1849. Hodiaŭ, kvankam ni tiom malproksimiĝis de la romantika epoko, la poezio de Słowacki pro sia eksterordinara belo influas senĉese kaj apartenas al la trezoro de viva pola kulturo.

Jam en liaj unuaj literaturaĵoj ni trovas dramojn; efektive en la dramfako la meritoj de Słowacki estas grandegaj, ĉar ĝustadire li kreis vere grandajn tragediojn — en la tipo de Shakespeare. Inter ili la ĉefan lokon okupas „Lilla Weneda" prezentanta malesperan batalon de invadintaj Leĥoj kontraŭ la enloĝintaj apud Gopło Wenedoj; ĝi montras al ni edifan tragedion de familio reĝa ne nur pro deveno, sed pro spirito. La reĝo Derwid, reĝo vera havas ĉe sia flanko filinon kaj defendantinon Lillan Wenedan. Ŝia karaktero — jen subtila virineco en la servo de profunda amo al la patro kaj fratoj, jen forgeso de propraj suferoj kaj doloroj pro la bono de publika afero. La persono de Lilla povas kuraĝe stari apud la Shakespeare'a Kordelio des pli, ke oni pli proksime kaj pli bone ŝin ekkonas ol la filinon de la reĝo Lear.

Krom „Lilla Weneda" kaj „Balladina", tragedioj, en kiuj la poeto per la fulmoj de sia genia fantazio provis lumigi la krepuskojn de prahistorio de Polujo, ni havas kelkajn dramojn prezentantajn konfliktojn sur la fono de pola vivo en la XVII. kaj XVIII jc. Tie apartenas „Mazepa", „Ora kranio", „Horsztyński", „Arĝenta sonĝo de Salomea", „Pastro Marek" kaj aliaj. Por karakterizi la malfacilajn kondiĉojn, en kiuj vivis same la pola nacio kiel ankaŭ nia poeto sufiĉas mencii, ke Słowacki vidis neniun sian dramon sur la scenejo kaj sole per sia sorĉa fantazio kreis tion, kion rifuzis al li la malmola politika efektivo.

La romantika poeto postlasis ankaŭ verkojn, kiuj estas certagrade persona konfeso de Polo-patrioto. Al tiuj apartenas drama poemo „Kor-

djan", poemoj „Anhelli" kaj „Beniowski". En tiu lasta poemo blindigas nin la poeto per neordinara brilo de sia arto. La lingvo fariĝas tie materialo tiel sklave obeema al sia absoluta estro, kia estas Słowacki, ke li kantas en ĝi same ironiajn kaj polemikajn aludojn al siaj malamikoj, kiel ankaŭ senlime lirikajn adiaŭojn al la patrino kaj amatino, kaj en grandiozaj, nekompareblaj strofoj adoras la grandecon de Dio aŭ sian sorĉan estrecon de vorto super la popolo.

En fiera antaŭsento de senlimaj meritoj por la artismo de pola lingvo parolas Słowacki pri la pola popolo, ke ĝi

Se volos ami — mi cignajn oferos
Voĉojn, por ke ĝi kantu sian amon,
Por la blasfemoj mi vortojn liveros,
Mi ĝin varmigos por ardi en flamoj,
Mi ĝin kondukos al Di', super teron...

Ne estas mirinde, ke tiu strofo troviĝas en „Beniowski", ĉar en tiu poemo la poeto montris ne nur grandan riĉecon da motivoj kaj bildoj, sed la muzikon de vorto kunigis kun la bildoj, kiujn ĝi al ni altrudas. „Słowacki mem bonege konsciis la sintezan naturon de siaj lingvo kaj stilo kaj celis konscie, kiom tion postulis la bezono, al kunigado de impresoj vid- kaj aŭdosentaj en unu nedivideblan tuton, en unu subtilan, brilantan kaj sonoran samtempe teksaĵon, per kiu li vestis siajn internajn sentojn, pensojn kaj viziojn". (Matuszewski: Słowacki i nowa sztuka). Konsiderante tion ni povas ĝis certa grado almenaŭ klarigi al ni la strangan ĉarmon de la poezio de Słowacki, influantan je la junularo ankoraŭ hodiaŭ, kaj la influon, kiu precipe montriĝis ĉe multaj poetoj polaj en la dua duono de l' XIX jc., ekz. Asnyk, Konopnicka, Tetmajer.

Bazo de tiu influo estis la impresemo de poezio de Słowacki, tio estas tiu cirkonstanco, ke liaj verkoj, same priskribantaj la pejzaĝojn, kiel esprimantaj sentojn kaj aspirojn homajn, spiras puran poeziecon kaj ŝajnas suprenlevitaj de la surtera, ĉiutaga vivo. Kiam ekz. la poeto venas al Aleksandrio kaj vidas flugantajn super la maro cikoniojn, kiujn li „vidis sur pola kampar'", tiam el lia animo ekfluas la belega „Himno dum subiro de l' suno", profunde trapenetrita per sopiro al la Patrujo kaj familio, de kiuj dividis lin la fatala forto de potencaj malamikoj. En mallonga versaĵo enhavigas Słowacki ĉiujn motivojn de l' nostalgio mordinta la animojn de miloj da elpelitoj kaj la „Himno" fariĝas klasika esprimo de melankolia agordiĝo de nia elmigrintaro.

Alifoje, en la poemo „En Svisujo", sur la fono de l' pejzaĝo de alpaj montoj li disvolvas antaŭ ni miraklan idilion de amo. Li skizas ĝin per trajtoj tiel subtilaj, orumas per abundo de fantazio kaj delikateco de sia

sentemo tiel mirinde, ke fakto tiel simpla, kiel la migrado de junulo kun la amatino tra Alpoj aperas en briloj nekonataj, kaj ordonas al ni sopiri al tia amo.

Malnova kritikisto, prof. Małecki, difinis, ke en la verkoj de Słowacki „frapas ia strange melankolia ĉarmo de poezia mondrigardo". Tion oni sentas en la granda mistika eposo „Reĝo-Spirito", sentas ankaŭ en mallonga, tre ŝatata de la poeto mem, preĝo „Genesis de Spirito".

Ni nomis preĝo tiun traktaĵon filozofie-mistikan, ĉar skribita ĝi estas en formo de konfeso antaŭ Dio, konfeso profunda kaj sublima pri vojoj de spirito ĉion formanta en la naturo, komencante de ŝtono kaj finante per la homo. Tiu verko estis kreita kaŭze de profunda aliiĝo de spirita vivo de Słowacki, kiu komencis fariĝi en la 1842 j. sub la influo de mistikulo Andreo Towiański. La poeto formis tiam en si novan, ĉion en la vivo enhavantan ideon pri la rilato de l' homo al Dio kaj kun la plej profunda konvinko esprimis la dogmon, ke „ĉio per Spirito kaj por Spirito kreita estas kaj nenio por la korpa celo ekzistas". Tiun ideon li vestis per belegaj bildoj de evolucio de neorgana kaj organa naturo kaj kunigis ilin en unu tuton kiel rememorojn de sia propra spirito, ĉirkaŭrigardanta en la formoj de mondo, kiujn li iam mem kreis.

La lasta vivperiodo de Słowacki (1842—1849) portas la stampon de profunda religiemo. Se la poeto diris iam en „Tombo de Agamemnon", ke Polujo malliberigas sian „animon anĝelan en poto vulgara", tiam li mem ne malliberigis en si, sed formis anĝelecon dun longaj jaroj kaj antaŭdiris, ke „post li resto la fatala forto, kiu nin panmanĝulojn anĝeligos". Kaj efektive, se oni submetas sin al la ĉarmo de lia poezio, tiam sendube li scipovas forŝiri de surteraĵoj ĉiutagaj en la mondon de belo, en la mondon de anĝeleco de niaj animoj. *Prof. Dr. Franciszek Bielak.*

JULJUSZ SŁOWACKI.

MIA TESTAMENTO.

Mi vivis kun vi, ploris, kun vi mi sopiras;
Noblajn homojn mi amis konstante kaj ĉie,
Hodiaŭ kun spiritoj mi antaŭen iras
Malgaja, kvazaŭ estus feliĉo ĉi tie.

Nenian heredanton mi ĉi tie lasis
Nek por la nomo mia, nek por kordoj miaj,
Ĉar simile al fulmo nom' mia forpasis
Kaj daŭros kiel sono, dum generacioj.

En legendoj prikantu vi, kiuj min vidis,
Ke pro patruj' ne unu mi suferis vundon
Kaj — dum ŝipo batalis — mi sur masto sidis,
Kiam dronis — mi iris kun ŝipo sur fundon.

Iam ĉiu konfesos, en penso medita
Pri sorto de patrujo mia malfeliĉa,
Ke bril' de mia kor' ne estis elpetita,
Sed per gloro de miaj antaŭuloj riĉa.

Nokte miaj amikoj kunvenu en rondo,
En aloo bruligu mian lacan koron,
Kaj kor-cindron forportu al patrin' — en mondo
Oni tiel repagas patrinan doloran!

Kiam miaj amikoj ĉe pokaloj festos
Por forgesi doloron kaj propran lamenton —
— Mi montriĝos al ili, se fantom' mi estos
Mi ne venos — se Di' ne ĉesigos turmenton.

Mi petegas — vivantoj ne perdu esperon
Kaj alte portu helan torĉon de klerigo!
Laŭvice, eĉ de propra viv' faru oferon,
Se ilin sankta devo vokos, ne instigo!

Kaj mi lasas ĉi tie amikaron mian
Malgrandan, kiun povis kor' fiera ravi.
Mi plenumis malmolan, gravan servon dian
Kaj tombon neplorotan mi konsentis havi.

Kiu, kiu alia sen aplaŭd' de l' mondo
Tiel indiferenta irus kaj fiera?
Kiu gvidos spiritojn sur la viva ondo
Kaj trankvile forflugos, kiel sonĝ' etera?

Kaj tamen post mi restos la fatala forto,
Kiu dum viv' nur frunton mian ornamigas,
Sed ĉiam nevidebla premos vin post morto,
Ĝis kiam, panmanĝuloj, ĝi vin — anĝeligos.

Tradukis Juljan Tuwim.



SŁOWACKI W PRZEKŁADACH ESPERANCKICH.

SŁOWACKI EN ESPERANTAJ TRADUKOJ.

Do Esperanta przekonał mnie Słowacki... Przed 20 laty wpadła mi do ręki dziwna książeczka: *„La interrompita kanto“ de Eliza Orzeszko.* Przeglądając ją znalazłem fragmenty wierszy:

Pri taŭgeco de Esperanto konvinkis min Słowacki. Antaŭ 20 jaroj mi trovis hazarde strangan libreton: *„La interrompita kanto“ de Eliza Orzeszko.* Foliumante ĝin mi renkontis fragmentojn de la versoj:

De kiam ŝi flugis per sonĝo la ora,
Mi svenas, sopire sekiĝas dolora,
Ne scias mi, kial l'anim' al ĉieloj
Ne flugas el cindroj post ŝi al anĝeloj...

»W Szwajcarji«... Bodaj, że dla skrontrolowania wierności, a nawet nie to — dla skonstatowania niemożliwości przekładu krystalicznych, tęczowych strof Słowackiego zabrałem się do studjowania języka międzynarodowego.

Znalazł Słowacki odtwórcę w języku esperanckim, który jak mało kto potrafił wniknąć w głębię uczucia, a któremu »każdy rym choć najprostszy swoim rogiem djabeł ostrzył«. Odtwórcą tym to największy po Zamenhofie mistrz języka międzynarodowego, największy poeta esperancki — Antoni Grabowski. Z pod jego pióra spłynęło tłómaczenie *„Szwajcarji“* tak wierne, tak świetne, że bezwzględnie żaden inny język przekładem takim poszczycić się nie może. Po »Szwajcarji« obdarzył Grabowski literaturę esperancką *„Ojcem zadżumionych“*, *„Hymnem o zachodzie słońca“* i wreszcie granym w r. 1912 w czasie VIII. kongresu w teatrze krakowskim *„Mazepą“*. Wszystkie te

»En Svisujo«... Preskaŭ por kontroli la fidelecon, aŭ eĉ ne — por konstati la neeblecon traduki la kristalajn, ĉielarkajn strofojn de Słowacki mi komencis studi la lingvon internacian.

Słowacki trovis en la lingvo internacia tradukinton, kiu kiel malmultaj scipovis enprofundiĝi en liajn sentojn, kaj al kiu »ĉiun rimon eĉ plej simplan per sia korno djablo akrigis«. Tiu tradukinto estis la plej granda post Zamenhof majstro de Esperanto kaj la plej granda esperanta poeto — Antoni Grabowski. Elsub lia plumo fluis la traduko de *„En Svisujo“* tiel fidela, tiel grandioza, ke sendube neniu alia lingvo povas pri tia traduko fieri. Post »Svisujo« donacis Grabowski al la esperanta literaturo *„Patron de pestuloj“*, *„Himnon dum subiro de l'suno“* kaj fine la luditan en 1912 jaro dum la VIII. kongreso en la krakova teatro *„Mazepan“*. Ĉiuj ĉi tradukoj same be-

przekłady równie piękne, równie wierne, nie zatraciły niczego z cech charakterystycznych pierwowzoru.

Po Grabowskim mało już kto odważał się na tłómaczenie dzieł wieszcza. Zdawać się mogło, że p. Czesław Kozłowski, który rywalizując z Grabowskim „*Ojca zadżumionych*“ przełożył powtórnie, a nawiasem mówiąc nawet lepiej bo rymem — pierwszy przekład jest nierymowany — będzie godnym kontynuatorem prac Grabowskiego, lub że p. Juljan Tuwin, który w języku esperanckim zdobywał ostrogi poety i tłumaczeniem „*Testamentu*“ dał poznać wybitny swój talent, wzbogaci literaturę esperancką dalszymi przekładami.

Odwagi im brakło lub tchu...

Po nich nikt już nie próbował dotychczas mocować się ze Słowackim. Wieści chodziły przed wojną, że »Lillę Wenedę« ktoś przetłómaczył i »Anhellego« ktoś inny próbuje, nie ukazały się jednak utwory te w druku.

Niewiele tego — ale bodaj, że więcej niż w innych językach się ukazało. W każdym razie wystarcza, by światu dać możność poznania wielkości Słowackiego.

laj, same fidelaj, perdis neniun econ karakterizan por la originaloj.

Post Grabowski nur malmultaj kuraĝis traduki la verkojn de l' granda poeto. Povis ŝajni, ke sinjoro Czesław Kozłowski, kiu rivalizante kun Grabowski denove tradukis „*Patron de pestuloj*“, parenteze dirante eĉ iom pli bone, ĉar rime, — dum la unua traduko estis senrima — estos kontinuanto de Grabowski, aŭ ke sinjoro Juljan Tuwim, kiu en Esperanto unue provis siajn poetajn fortojn kaj en la traduko de „*Mia testamento*“ aperigis sian talenton, riĉigos la esperantan literaturon per pluaj tradukoj.

Kuraĝo mankis al ili aŭ forto...

Post ili neniu plu provis lukti kun Słowacki. Onidiroj rakontis antaŭ la milito, ke iu esperantigis »Lilla Weneda« kaj ke iu alia provas traduki »Anhelli«, tamen ne aperis tiuj verkoj elsub la preso.

Malmulto do estis ĝis nun tradukita — tamen eble pli ol en aliaj naciaj lingvoj. Ĉiuokaze eĉ tio sufiĉas por doni al la mondo ideon pri la grandeco de Słowacki.

Baroko.

WŁADYSŁAW ST. REYMONT.

SUPER LA ABISMO.

(F I N O).

Revenadis la konscio kaj tiam ŝajnis al li, ke li sonĝis teruran sonĝon, el kiu li ne povis vekiĝi.

Tiam li ĉirkaŭiradis kurbiĝinta palpante la glatajn murojn: ne, ne estis eliro, kaj sur la rompitaj fenestroj kuŝis abismo...

la suspektinda brueto ektremis kvazaŭ sub la tronbaldakeno; li kaŝiĝis malantaŭ iu kurteno kaj kun haltigita spiro, ŝvitkovrita atendis en sufero, ĉar ŝajnis al li, ke oni venas, ke jam pleniĝas la salono... ke knaras la planko sub la pezaj paŝoj, ke armiloj tintas, kaj ke de ĉiuj flankoj etendiĝas iaj rabavidaj, senkompataj manoj...

Li etendis la spadon kaj defendis sin furioze, tranĉis la mallumon, mortigis la krepuskojn, trapuŝis la malplenon kun superhoma kri' de l' kolero.

Subite kvazaŭ ciklono skuis la kastelon.

Tondro da krioj kaj lumoj enfalis en la fenestrojn, nigraj stratprofundoj ŝutis la lumojn, pluvego da kugloj falis sur la murojn kiel densa hajlo.

Li rekonsciiĝis.

— Al mi gvardioj! Al mi! — li kriis tra la fenestroj, sed lia voĉo pereis, kiel susuro de l' folio dum la uragano.

La batala orkano daŭris jam sur la bordo, proksimiĝis el la profundo de l' urbo kaj ruliĝis kun muĝo al la ponto sub la kastelon.

Maro da fajro disverŝiĝis super la urbo, miloj da fajraj kolonoj flagris en la krepuskoj kaj sube, sur la stratoj tondris miloj da pafoj kaj miloj da gorĝoj muĝis sovaĝan kanton de venĝo.

Kiel montaltaj ondoj, prempuŝis sin de la stratoj la batalantaj amasoj, kiel nigraj nuboj elspirantaj tondrojn de pafoj kaj krioj. Ili fluis de ĉiuj flankoj, el ĉiuj domoj elverŝiĝis, kaj el ĉiuj anguloj, tegmentoj kaj fenestroj ŝutiĝis mortiga hajlo da kugloj.

Fleksitaj kaj miksitaj linioj de militistaro retiriĝis paŝon post paŝo, kaj ĉiumomente ili malaltigis la bajonetojn kaj frapis la premantan amason, ĉiumomente nehoma kriego disŝiris la aeron, la amaso haltiĝis, svarmis kaj denove frapis kun nehaltigebla forto, puŝiĝis kiel blinda, densa maso, kiel lavango detruanta ĉion renkontitan.

Kaj de la kastelo ĉirpis jam konstante la granatoj, leviĝis kiel raketoj, desegnis fajroarkon super la akvoj kaj falis en la amason, disŝirante kun terura krako, mortigis centojn, sed ne haltigadis.

La amaso ne retiriĝis, forbalais ĉiujn barojn kaj kun rabio atakis la lastajn remparojn kaj la ponton.

Ili batalis kiel blindaj kaj senkonsciaj, pereis sen ĝemo kaj timo kaj forpuŝataj per la bajonetoj, surtro-

tataj, frakasataj, disŝirataj per ŝrapneloj, paŝis senĉese antaŭen kun terura hurlo de frenezuloj, kun nepardonemo de l'kolero kaj venĝo.

Kaj li ne plu iluziiĝis per espero de l'venko, ŝtona kvieto ekregis lian animon, kaj indiferente kvazaŭ spektaklon li alrigardis la batalon ĉiam pli proksiman, la sovaĝan furiozon, kun kiu oni sin mortigadis sur la ponto.

La popolo konstante frapis per la brustoj kontraŭ la bajonetoj, retiriĝadis kun murmuro kaj frapis ankoraŭ pli potence, frapis senlace, nevenkeble, kvazaŭ senmorta.

Kaj liaj fidelaj defendantoj, liaj nigraj gvardioj pereis ĝisfine, li vidis, kiel ĉiumomente miloj da glavoj, falĉiloj kaj stangoj leviĝadis kaj kvazaŭ draŝiloj feraj faladis sur iliajn nigrajn, sentimajn kapojn, li vidis, kiel ili kunpremitaj, brako ĉe brako, defendis sin obstine kaj mortadis, kaj la amaso sur ili fluis kaj surtrotis kiel uragano...

Indiferente li alrigardis ĉion, nur kiam potenca kanto kaj krio eksplodis el la brusto de l'amasoj, li elrigardis senkonscie.

Sur la ĉefa bastiono de l' kastelo ekflirtis la standardo de l'ribelo kaj sur la lastaj fortikoj oni elpendigis la blankajn standardojn, la soldataro ĵetadis la armilojn, fratiĝis kun la amaso kaj deturnis la kanonojn kontraŭ la kastelo.

— Ĉio baldaŭ finiĝos... — li pensis trankvile.

Finiĝis la batalo, nur tie kaj ie aŭdiĝis ankoraŭ muĝoj de murdoj kaj pafoj, kaj la popolo jam kiel rivero senfina fluis tra la ponto kaj disverŝiĝis sur la kastela placo, kaj super ĝi leviĝis ĉielen ebriiga kanto de l'venko, reĝa kanto de l'potenco. Li aŭskultis ne forturnante la okulojn de amaso svarmanta kiel nekalkulebla formikaro, sed li komencis tremi kvazaŭ pro penetranta malvarmo.

— Blankaj standardoj ĉe la pordoj! Iras la intertraktantoj!

Li ĉirkaŭrigardis rapide, la tuta konsilantaro, ĉiuj ministroj kaj konsilistoj, ĉiuj princoj kaj sinjoroj premiĝis al la tronsalono.

— Post momento ni ĉiuj mortos! li diris mallaŭte kaj majgaje.

— Ni ne kapitulacios senkondiĉe! iu ekkriis.

Li ridetis kaj rigardis ian malproksimon, ian misteron aperantan en la ombroj.

— Kaj kion deziras la intertraktantoj? — li demandis fine.

— Vin, sinjoro! — aŭdiĝis konsenta ĥoro de l' eminetuloj.

— Min? Min?

— Ili postulas vin kaj ni vin transdonos!

— Por fini la hejman militon...

— Por savi la proprajn kapojn! Bone, savu vin! Bone!

Li flustris alrigardante iliajn vizaĝojn kun moka rideto. Ili retiriĝis mallevante la okulojn kaj li proksimiĝis al kelkaj kaj kvazaŭ por adiaŭo parolis:

— Ci estas kulpa pri la malsatoj!

— Ci drinkis iliajn oron kaj sangon!

— Ci estis ilia ekzekutisto!

Li ĵetadis kontraŭ la blupalaj pro timo vizaĝoj; ili silentis, nur iliaj lipoj tremis kaj kurvagis la okuloj sangoplenaj, sed ili premiĝis ĉirkaŭe, kroĉante sin al li kiel al la lasta savobreto.

— La popolo jam malpacienciĝas! Rapidu.

Ili ĉirkaŭis lin per netrairebla arbaro da nudigitaj sabroj, ekprenis je la brakoj, ĉar li iom ŝanceliĝis, kaj kondukis.

Oraj standardoj iris antaŭe kaj vicoj da torĉoj, kaj post ili la amaso, vestita per diverskoloraj vestoj, kvazaŭ kampo florplena disvolviĝis tra la senfina amfilado de salonoj.

Mallaŭta, singultanta himno de l' morto sonis sub la malaltaj arkaĵoj tiel, ke la lumoj flagretis.

Ili iris malrapide tra galerioj, ŝtuparoj, terasoj kaj etaĝoj, paŝis ĉiam pli malsupren, ĝis tiu maro, alfluanta malpacience ĝis la kastela pordego, kaj li grandega, kvazaŭ kverko superis ĉies kapojn kaj rigardis per la okuloj kvazaŭ ne plu de ĉi tiu mondo.

Lis sciis, kio lin tie atendis.

Tamen lia animo estis jam ne plu atingebla por ĉio homa kaj kvazaŭ jam formortinte por la vivo komencis la lastan flugon destinitan kaj portis sin sentime kontraŭ la nekonataĵo.

Jam li rigardis al la transmondoj kaj auskultis senfinaĵon.

Kaj iafoje ŝajnis al li, ke oni portis lin al la tombo de la patroj kaj baldaŭ lasos por la eterna kvieto kaj ripozo.

Kaj jam li sonĝis sonĝon pri si kaj pri tiuj homsvarmoj, kiuj kvazaŭ palaj ombroj trafluas en la senfina, senĉesa ondo de l' vivo.

La procesio haltis en grandega halo, trans la feraj pordoj bruegis muĝo de l' amasoj kvazaŭ rabianta maro.

La vizaĝoj paliĝis, iu ekploris malespere.

La kanto silentiĝis, malfermiĝis la pordegoj kaj ili eliris sur la placon.

La amaso forte ekmoviĝis, reiris iom de la pordego kaj kvazaŭ rigidiĝis enpuŝante milojn da okuloj en lian vizaĝon malvivan. Iu tiris lin je la mano, elkondukis kaj diris laŭte:

— Jen li! Prenu lin!

Li faris aŭtomate kelkajn paŝojn kaj alrigardis la vizaĝon de l' popolo, la nepardoneman vizaĝon de l' destino.

. . . . . .

Triumfanta morto eksidis sur la orfigita trono de l' mondo kaj ridis moke, longe kaj senkompate.

Tradukis Bronisław Kuhl.

ESPERANTISTA MOVADO.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

Rozmach rozwoju esperanta na calym świecie jest tak potężny, liczba ważnych zdarzeń tak brzemienna, iż nie sposób »zagranicznemu« sprawozdawcy na szczupłych szpaltach naszego miesięcznika podać wszystkie ciekawe wypadki. Przeto z konieczności ograniczamy się do jeno kilku.

Powszechne słyszy się utyskiwania na małe zajęcie się esperantem przez państwa, a skutkiem tego na skazanie ruchu na zagładę itd., itd.

A co mówią fakta?

RZĄD RUMUŃSKI wydał ostatnio »Otwarty rozkaz do dyrekcyj szkół w kraju«: »Na skutek prośby Rumuńskiego Towarzystwa Esperantystów pod przewodnictwem ministra Trancu-Iasi, polecamy Dyrekcjom szkół udzielić pomocy prof. Tiberiu Morariu w urządzaniu kursów esperanta zarówno dla uczniów, jak i dla publiczności«.

Minister: Kiritescu (—).

RZĄD JUGOSŁOWIAŃSKI (SHS.) rozporządzeniem Min. Kolei zaprowadził we wagonach kolejowych napisy esperanckie, jak np. »nie wychylać się«, »hamulec bezpieczeństwa« i inne.

RZAD PRUSKI pismem Ministra Wiedzy, Sztuki i Oświaty Ludowej upoważnił dyrekcje szkół do zwolnienia w miarę możności nauczycieli ze służby celem umożliwienia im wzięcia udziału w XIX. Kongresie w Gdańsku.

RZĄD WOLNEGO MIASTA GDAŃSKA wydał z okazji tegorocznego Kongresu oficjalne, omarkowane kartki pocztowe z esperanckim tekstem i tytułem naszego ogólnoświatowego Kongresu. Serja składa się z 22 różnych kart. Precedens w tym kierunku stworzył

RZĄD ZWIĄZKU SOCJALISTYCZNYCH REPUBLIK RADZIECKICH (ZSRR.) pierwszy wydając kartki i znaczki pocztowe z esperanckiemi napisami.

Sław.

INTERNACIA MEDICINA KONGRESO EN WARSZAWA.

La 30-an de majo okazis en Warszawa malfermo de IV. Internacia Kongreso de militistaraj medicino kaj farmacio. Inaŭguro okazis en bele dekoraciita impona halo de Politekniko en la ĉesto de ministro-prezidanto marŝalo Piłsudski, kelkcent uniformitaj oficialaj reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj ŝtatoj kaj miloj da ekster- kaj enlandaj kuracistoj kaj farmaciistoj. Malferma kaj kelkaj salutaj paroladoj, flanke de poloj, okazis en la franca lingvo, sole la parolado de la brita reprezentanto okazis bedaŭrinde en la angla lingvo, tre malmulte komprenata de la ĉeestintaro. La nombro de kuracistoj esperantistoj ne estis tiom granda, ke ĝi influu la kongreson, tamen oni sukcesis ekinteresigi pri Esperanto prof. D-on K. Hossomi el la universitato Kyushu en la urbo Fukuoka kaj D-ron Koganei el la universitato en Tokio, ankaŭ la komandanton s-on Hoguti Kiitiro, militistan ataŝeon ĉe la Japana Legacio en Warszawa.

Antaŭ nelonge trapasinta Warszawa'n la profesoro de jura medicino ĉe la universitato en Nagasaki, s-o Hasime Asada, fervora esperantisto, plantinta japanajn semojn sur la tombo de l' Majstro en Warszawa, estas persona konato de prof. K. Hossomi.

D-ro Jan Mędrkiewicz.

POLLANDA KRONIKO.

KRAKÓW. La 30/IV. okazis la ĝenerala kunveno de Studenta Esperantista Rondo (Akademickie Koło Esperantystów), kiu elektis novan estraron: Maksymiljan Ziomek — prez., Antoni Franus — vicprez., Tadeusz Hodakowski — sekr., Rajmund Kowalski — kas., Emil Janczałek — estrarano. Al Revizia Komisiono apartenas: Feliks Gross, Ignacy Rose, kaj Józef Weissmann. Adreso por la korespondaĵoj: M. Ziomek, Kraków, Wincentego Pola 5.

ROŻDZIEŃ-SZOPIENICE. La grupo »Espero« aranĝis la 10/IV. publikan paroladon pri la temo »Kio estas Esperanto«. Referatis s-o D-ro Broder el Katowice. Ĉe la jarkunveno estis elektitaj kiel estraranoj: s-o Urbańczyk — prez., s-o Zioło — kas. Ĉe la lasta kunveno estis ŝanĝita la nomo de la grupo, kiu de unu nomiĝas: Rożdzień-Szopienice anstataŭ Rożdzień.

WARSZAWA. Pola Studenta Esperantista Societo malfermis la 2/V. superan instruistan kurson por siaj membroj, kiun gvidas s-o Mieczysław Trochimowski. La kurso okazadas trifoje en ĉiu semajno kaj daŭros 4 monatojn. Post longa penado P. S. A. S. estas legalizita ĉe la Varsoviaj altlernejoj. De nun la societo povas aranĝadi prelegojn ĉe ĉiuj lernejoj. La unua prelego okazis ĉe Studenta Kolonio, la dua estas aranĝata ĉe la Lernejo de Politikaj Sciencoj. La eldona sekcio disvolviĝas bone: baldaŭ aperos dua propaganda broŝuro.

ZAGŁĘBIE DĄBROWSKIE. Dum Pentekosto malgraŭ pluvo tre bone sukcesis la en la antaŭa N-o de »P. E.« avizita ekskurso al Ojców aranĝita de la verdaj TUR-anoj de la filioj Sosnowiec kaj Będzin. La propaganda influo estis kontentiga. Kantoj kaj insista babilado allogis al Esperanto-lernado TUR-filiojn en Olkusz kaj Czeladź. Multaj flugfolioj estis disĵetitaj tra la tuta »Pola Svisujo«. Krom tio la grupoj de Dąbrowa kaj Sosnowiec aranĝis kontentigan ekskurson al Piekło. Muziko, kantoj kaj danco agrabligis la momentojn de l' ekskurso.

ĈIRKAŬ LA ESPERANTISTA KONGRESO EN DANZIG.

El inter la postkongresaj ekskursoj al Polujo la unuan lokon ŝajnas okupi la preparata de la redakcio de »Katoliko Mondo« kaj pasto B. Wachowski el Elberfeld ekskurso de Katolikaj Esperantistoj. Ankaŭ ĝiaj celoj estas iom pli altaj, ol simpla turista ekkono de kelkaj polaj urboj kaj pejsaĝoj, aŭ daŭrigo de kongresaj amuzoj. La ĉefa celo estas iom rektigi la falsajn ideojn, kiujn havas pri si reciproke Germanoj kaj Poloj, alproksimigi, kiom tio estas en kelkaj tagoj ebla, la germanajn kaj polajn animojn. Por tiu nobla celo laboras nun fervore pastro Wachowski kune kun la »Katolika Mondo« en Germanujo kaj ĉi tie p-o D-o Bujwid. Ke tiu celo ne malhelpas

la aliaj, turistajn, propagandajn k. t. p. estas memkompreneble, eĉ ĝuste ĝi povos ilin multe pligravigi.

La provizora programo de tiu ekskurso estas jena: deprenante kelkajn tagojn de Danzig por povi viziti Poznań kaj Gniezno oni intencas forveturinte la 26/VII. de Elberfeld veni la 27-an al Poznań por 3-taga restado kaj ekskurso al Gniezno; al Danzig oni iros la 31/VII. La postkongresa vojaĝo al Polujo estas planata jene: 4—8/VIII. en Warszawa, 8/VIII. en Częstochowa, 9—12/VIII. en Kraków kun eventuala ekskurso al Borysław, la 13/VIII. hejmreveno tra Praha.

Ĝis nun aliĝis dekdu personoj; ni esperas, ke same la bela celo, kiel la alloga programo de l' ekskurso altiros multajn aliajn samideanojn, des pli ke la polaj samideanoj ĉie faros la plejeblon por inde akcepti tiel karajn gastojn.

* * *

La Varsoviaj studentaj esperantistaj societoj intencas organizi dum la XIX. Kongreso de Esperanto en Danzig studentan fakkunsidon. Ĉiuj partoprenantoj kaj interesiĝantaj studentoj anoncu senprokraste sian adreson al Pola Studenta Esperantista Societo, Warszawa, Leszno 99, m. 5 aŭ al: Akademia Esperantista Rondo, Warszawa, Nowy Świat 21.



B I B L I O G R A F I O.

La Sankta Biblio. Malnova kaj nova testamentoj, tradukitaj el la originalaj lingvoj. Londono, Brita kaj Alilanda Biblia Societo, 1926.

Fine — aŭ pli ĝuste, jam — la esperantistaro ricevis la plenan Sanktan Skribon! Kaj ricevis Ĝin en tia formo, ke malmultaj nur nacioj povas pri tia traduko fieri. Ja la Malnovan Testamenton esperantigis neniu alia al la Majstro mem. Oni povus pripensi, ĉu eble la celo de la tuta vivo de Zamenhof ne estis liveri al la homaro la de ĉiuj kompreneblan tekston de la Biblio. Ĉiuokaze per komenco de la Genezo li komencis Esperanton (lia unua broŝuro pri la Lingvo Internacia ĝin enhavas) kaj mallonge antaŭ la morto li finis la grandegan verkon... kaj en sia modesteco transdonis gin al biblia komitato pro korekto. La komitato nemulte bezonis korekti por agordigi la tekston kun diversaj naciaj tradukoj. Al tio ĝi aldonis la jam antaŭ la milito aperintan la Novan Testamenton tradukitan de la anglaj pastroj-samideanoj kaj tiamaniere donacis al la mondo esperantista verkon monumentan, kiu por ĉiam restos en nia literaturo. Malavara helpo de anglaj samideaninoj ebligis eldoni ĝin kun tia lukso, kian neniu libro esperanta posedis ĝis nun.

Bedaŭrinde al la Biblia redakta Komitato apartenis neniu katolika aŭtoritatulo kaj tial la verko ne estas ankoraŭ por la katolikoj permesita. Ni esperas tamen, ke la katolikaj esperantistaj rondoj faros ĉion eblan, por liveri al ni la Sanktan Skribon provizitan per la necesa „imprimatur“ kaj ke ĉe tiu laboro ili ne preterlasos senatente la ĝis nun faritan laboron, precipe ne la grandiozan verkon de la Majstro. *Baroko.*

Vortoj de profesoro Th. Cart. Eldonejo Esperantista Voĉo, Jasło, 1927.

Samideanoj Grenkamp kaj de Lajarte havis la bonegan ideon honori la Prezidanton de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, prof. Cart, per eldono de liaj precipe prilingvaj artikoloj, aperintaj depost 1905 en „Lingvo Internacia“.

La artikolaro ne estas kompleta, ĉar la kompilantoj elektis sole la plej interesajn. Kaj fakte oni legas la libron kvazaŭ novelaron aŭ ian libron de memoraĵoj. Eĉ la kontraŭuloj de prof. Cart devas konfesi, ke lia devizo „ni fosu nian sulkon“ estas la sole akceptinda, se temas pri la ekzisto de Esperanto. La ideoj de Cart, ĉiam konsekvencaj, permesas, ke por ilin karaktrizi sufiĉas malfermi la libron sur iu ajn paĝo. Ekz. jena hazarde malfermita paĝo 89-a: „oni diras: Kial la Akademio, kiu estas pli kompetenta ol ĉiuj ajn, ne kreus la novajn vortojn? — Ne! ĉar la Akademio ne havas la rajton erari“ ĝiaj eraroj estus „oficialaj“ kaj pro tio danĝeraj. La Akademio povas nur akcepti tion, kion la vivo, la praktiko montris akceptinda, bona, „vivkapabla“.

Senŝancela optimismo, kredo pri la bonegeco de la vivevoluo de Esperanto prefere ol ĉiuj sistemaj, konsciaj direktadoj eĉ de kompetentuloj, tia estas la principa sintenado de Cart en la esperantolingva afero.

Nia opinio estas tute la sama. La laborojn pri la lingvo la sinteno de Cart neniel malhelpas. Ĉar ĉiu privata opinio de kompetentulo estas, eĉ se laŭ ĉiuj vidpunktoj de racio kaj taktiko senriproĉa kaj pravega, tamen nur homa kaj eraripova, tial tuja, „blinda“ forrifuzado de la Akademio pri oficialigo de novaĵoj estas sinteno absolute aprobinda. Neniel tio ĝenas la laborojn de kompetentuloj pri plitaŭgigo de la lingvo en la kadro de l' Fundamento,ĉu per propono de novaĵoj en libroj, ĉu eĉ per didaktikaj studoj. Ĉar ĝuste la konservema sinteno de la Akademio estas la plej bona garantio, ke neniuj „trofruaĵoj“ enkondukiĝos antaŭ ol fariĝinte generalaj kaj vivantaj, de la Akademio konstatataj kaj silente aŭ per klara esprimo aprobataj. *Dr. L. D.*

Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.
Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9